



# VERDA VOĈO DE DOKSY

## SALUTO AL POETO
/Al Karolo Fiŝ/

Vivas viro
kies koro
al beleco emas
kaj poemas,
sentojn veŝas,
rimojn versas
kaj amemo
ne estas ĉe li en anatemo.

Jen mi dozas mian guton
kaj sendas al li saluton.

Lia verko
kresku kiel kverko.
Lia tago,
ĉu surtero, ĉu sur /Mácha/-lago
estas por li ovo,
kiu sen kovo
de kokino
gvidas ne al kokido, sed al Georgino,
/ĉu al vera,
ĉu nure poet-ĥimera
post vino?/

Ŝi ne fariĝu orfino.
por ke ne ploru ŝia kor' sentema,
car poeto eble restus sen tema!
Li ja devas veni al or-fino!

/Rimaĵo nura de Adolf Staňura./

## KAJ KIO NUN?

En lasta tempo venas pli kaj pli ĝojigaj sciigoj pri Esperanto. La sukcesa triumfo ĉe Unesko, ĝia reviviĝo en Soveti prove ĝi estas instruata en diversaj lernejoj en multaj landoj, ĉiam pli kaj pli uzas ĝin diversaj radiostacioj, ankaŭ en filmon ĝi penetras kaj laŭ lasta sciigo ĝi estis jam uzita unuafoje kiel diplomata lingvo inter Sovetio kaj Japanujo.

Kaj kio nun? Ĉu ni estas sufiĉe preparitaj por eventuala venko, kiun ni ĉiuj sopiras, pri kiu ni ĉiuj laboras? Ĉu ni estas sufiĉe spertaj ankaŭ en praktika laboro ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto?

Ni devas esti realaj, ĉar reale ni devas ankaŭ vivi. Dum miaj societa, asocia, kursa kaj radio laboroj mi multon spertis. Pli multaj inter ni restas nur entuziasmuloj, ne praktikuloj. Multaj estas eĉ tiaj, kiuj pro entuziasmo al nia lingvo ĝin eĉ ne profunde lernas, por ili sufiĉas nur admiri ĝin kaj propagandi. Kaj ofte tia propagando eĉ malutilas. Oni ofte rigardas nin strangulo j.

Venas rapide la momento, kiam oni demandos nin: "Ĉu vi estas kapablaj plenumi la devojn, kiuj ekestas per oficiala enkonduko de Esperanto kiel lingvo internacia?"

NI DEVAS ESTI PREPARITAJ! Ankaŭ nunjare okazos Somera kolegio de Esperanto en Doksy. Ĝi okazos de 15. ĝis 29.VII.1956. Detalaj informoj estos publikitaj. Jam nun pripensu vian libertempon! Estos por vi ĝuo uzi libertempon en Doksy, en alloga regiono kun granda lago kaj samtempe tie perfektiĝi en via lingvoscio.

Ant. Slanina.